46a Internacia Seminario, 27.12.2002 - 3.1.2003 en Trier ĉe la Mozelo

# 2a informilo

## Kiel atingi la ejon:

La ejo de la ĉijara IS estas granda kaj agrabla junulargastejo en la plej malnova germana urbo: Trier.

### Per aviadilo:

La plej proksimaj flughavenoj troviĝas en Luksemburgo kaj Saarbrücken - de tie pluvojaĝu per trajno. Krome ekzistas la flughaveno Frankfurt-Hahn, kiu atingeblas nur buse (ekveturo de tie nur je la 10:30 kaj je la23:30) aŭ aŭte.

### Per trajno:

Trier estas haltejo sur la vojo Koblenz - Saarbrücken (ĉiuhore trajnoj en ambaŭ direktoj). Krome ekzistas ĉiuhora trajno el/al Luksemburgo. Utila retpaĝo por plani la vojaĝon estas www.reiseauskunft.bahn.de. Ekde la ĉefstacidomo uzu aŭtobuson: antaŭ la 20:15 linio 12, direkto "Pallien, Fachhochschule" (kajo 4) post la 20:15 linio 87, direkto "Quint, Schloss" (kajo 5). Elbusiĝu je la haltejo "Zurlaubener Ufer" kaj iru ĉ. 300 m dekstren laŭlonge de la Mozel-bordo. La busvojaĝo kostas 1,40 EUR.

### Per aŭto:

El la direkto Kaiserslautern/Saarbrücken: A1. El la direkto Koblenz/Köln: A 1/A 48. El la direkto Luksemburgio/Belgio : A 64. Fina alvojaĝo per la urba autoŝoseo A 602: Ĉiam daŭrigu rekte (ne iru maldekstren al „Verteilerkreis"); indikilo sekvas du kilometrojn post la fino de la urba autoŝoseo.

## Kion kunporti:

Memzorgantoj kunportu dormosakon kaj aermatracon aŭ similaĵon. Ni ĉijare havos nur ege malmultajn matracojn en la memzorgantejo. Eblas ankaŭ manĝi por memzorgantoj en la junulargastejo kontraŭ la prezo de 4 EUR je matenmanĝo resp. 5,60 EUR je tag- aŭ vespermanĝo.

Plenpagantoj ne bezonas kunporti proprajn litottolaĵojn ĉar la kotizo inkluzivas la prunton de la junulargastejaj litottolaĵoj. Indas kunporti sportvestaĵojn, tablotenisajn rakedojn, kasedojn, KDjn, fotilojn, lumbildojn kaj videofilmojn pri ĉiaj Esperanto-aranĝoj, ludojn, naĝkostumojn kaj dancŝuojn. Se vi volas kontribui al la muzika vespero (sed ankaŭ se ne!), kunportu viajn muzikilojn kaj muziknotojn.

### silvestra balo:

Por kune ĝui la jarŝanĝiĝon ni okazigos abundan bufedon kaj silvestran balon kun kostumkonkurso kun la temo "Esperanto-ekstremismo". Do kunportu ĉiujn Esperantaĵojn kiel flagojn, butonojn, signojn ktp …

## Kontribuu!

Ĉiaspecaj programeroj ankoraŭ bonvenas. Bonvolu sendi viajn kontribuproponojn kiel plej eble frue al la koncerna respondeculo (adresojn vidu sekvontpaĝe). Ni precipe invitas ĉiujn aktorojn kaj muzikistojn kontribui. Por ajna programero haveblas rabato!

### Volontuloj serĉataj!

La okazigo de la IS faciliĝas se ĉiuj ni iomete kunhelpas. La organiza teamo kore bonvenigas volontulojn kiuj povas fojfoje helpi en etaj sed gravaj taskoj. Bv. anonci vin ĉe unu el la organizantoj.

*Respondecas pri la enhavo de la dua informilo Torben Prokscha kaj Till Schönberner.*

## Adresoj:

**Aliĝilon al:**
Martin Sawitzki, Max-Planck-Ring 8d / L 56, DE-98693 Ilmenau, tel.: +49/ 3677 / 844505, faksilo: +49 / 89 / 244 345 696, rete: is.admin@esperanto.de

**Taga programo:**
Christof Krick, Taubenweg 25, DE-33102 Paderborn, tel. +49 / 5251 / 310073, rete: is.tema@esperanto.de

**Vespera programo:**
Moritz Scheuermann, Wilhelm-Dorn-Str. 17, DE-24536 Neumünster, tel.: +49 / 4321 / 43207, rete: is.vespera@esperanto.de

**Asocia adreso:**
Deutsche Esperanto-Jugend e.V., Grellstr. 36, DE-10409 Berlin, tel./fakso: +49 / 30 / 428 57 899, aŭ tel.: +49 / 177 / 28 34 320, rete: bero@esperanto.de, hejmpaĝo: www.internacia-seminario.de

**Adreso de la ISejo:**
Jugendgästehaus Trier, An der Jugendherberge 4, DE-54292 Trier, tel. +49 / 651 / 146 62 - 0 (alvoku nur dum la seminario!)

**IS-poŝtelefono:**
+49/160 / 20 21 650 (alvoku nur dum la seminario!)

Mapo de la urbo Trier haveblas ĉe www.internacia-seminario.de